



monda solidareco

N-ro 96 - Aprilo 2008 - kvaronjara - 1.25 €

LA VIZAĜOJ DE LA SOLIDARECO

Monda Solidareco kontraŭ la Malsato (MSM) nun estas pli ol 25jara ; ĝi devus ĝui belan prosperon, esti belstatura kaj floranta... kaj tamen dum la sinsekvaj kunvenoj de la Administra Konsilantaro ni miras kaj ni mem riproĉas, ke ĝi ŝajnas ne plu progresi, eĉ pli malbone, ke la nombro da individuaj¹ aliĝintoj malkreskas. « Burĝiĝo » diras iuj, « laciĝo pro aĝo » diras aliaj... Kiu evento povus revigligi la intereson por MSM ? Kiamaniere mobilizi kaj motivigi la aliĝintojn ?

Tiel ĝermis apud Poitiers la ideo de vojaĝo en Afrikon, ne donacita ĉar ni ne havas tiujn rimedojn, sed proponita al la aliĝintoj de la Puatua-Ĉarenta regiono. La ideo strukturiĝis kaj du administrantoj, Christian kaj Danièle kun tri globidaranoj, Edwige, Claudine kaj Bernard, proprakoste ekiris je la renkonto de siaj afrikaj samasocianoj.

Tiam la solidareco prenis vizaĝon, aspekton, rideton, ĝi prenis multajn vizaĝojn, ridojn, personajn nomojn, rigardojn, prematajn manojn ...

La vojaĝantoj, kiuj sekvis neniun turisman itineron, vizitis dekon da grupoj kun projektoj jam financitaj aŭ tuj financotaj, kaj renkontis novajn, entute pli ol cent burkinaj aliĝintoj, kiuj ankaŭ povis meti vizaĝon sur nomojn foje preterlegitajn en la bulteno. Iuj ekkonsciis pri la malfacila surloka realeco, ili taksis la signifon de ilia sindevontigo al MSM, la aliaj ŝatis tiun rekonon, kiu estas la renkonto. Iri al aliulo, akcepti, doni, ricevi.

Tiu vojaĝo estis ponto inter la Administra Konsilantaro, foje laŭsente fora, kaj la Burkinaj aliĝintoj. Ĝi okazigis interŝanĝojn pri la funkciaj reguloj de MSM, pri la rilatoj inter la Administra Konsilantaro kaj la grupestroj, pri la atendoj de la administrantoj kaj pri tiuj de la profitontoj ; ĝi okazigis interparoladon pri kio fluas kaj pri kio ne kongruas kun la vivo de la homoj en tiu regiono. Ĝi okazigis rememorigon, ke MSM ne estas monprovizanto, sed proponas « mutualistan » solidaran redisdonon de la komuna monhavo, kaj ke bedaŭrinde ĝi ne estas riĉa.

Tiu vojaĝo estis fruktodona : ekde sia reveno en Puatun la partoprenintoj sin implikis en la progreson de MSM ; la simplaj aliĝintoj fariĝas aktivaj : klarigo pri la celoj de MSM kun la prezento de la memorfotoj al kolegoj, amikoj, najbaroj, rikolto de aliĝoj, kreado de artaj kartoj vendotaj profite al MSM, decido sin impliki en la MSM-vivon ...

Ĉu la eksperimento denoviĝos en alia lando ? Kial ne ! Rikolti monon nun unuavicas, instigi aliĝojn al Monda Solidareco kontraŭ la Malsato kapabligos la teron nutri ĉiujn loĝantojn.

Danièle Charier

Enhavo

La vizaĝoj de la solidareco	p. 1
Vojaĝo per fotoj en Burkinio	p. 2
Mallonge	p. 4
Letero de legantino.....	p. 4
La vojoj de la Solidareco	p. 4
◆ tra Burkinio,	
◆ tra Togolando,	
◆ tra Francio	
Monda Solidareco kontraŭ la Malsato.....	p. 7
El la Administra Konsilantaro	p. 8
Financa raporto por 2007.....	p. 8

1. Tiuj, kiuj kotizas por denunci la malegalecon de la homoj kontraŭ la rajto je nutrado, kaj kiuj verŝajne ne petos financadon.

Ŝprucas « **Bonveno** » plena je afableco, komplezemo, korvarmo, rideto kaj rido : ni atingis Burkinion ! la kora akcepto de la « *Dignaj homoj* » ne estas trompogilo !

Dum la tuta vojaĝo kaj dum niaj vizitoj en urboj kaj en savano, ĉiam ni estas bonvenaj kaj akceptataj kun simpatio kaj koreco.

Dankon, Burkinaj amikoj, mi estas feliĉa kaj fiera, ke mi renkontis vin.

Claudine Tournier

Bilda vojaĝo de la MSM delegacio en Burkinio

*La delegacio estis kondukita de Christian Trianneau, konsilantarano de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, responsanto pri la dosieroj el Burkinio, kaj Danièle Charier, adjunkta federacia sekretariino. Ankaŭ ĉeestis la MSM-aj gealigintoj Edwige Geniteau, Claudine Tournier kaj Bernard Moreau.
En Vagaduguo nin akceptis kaj kondukis nia loka korespondanto Symphorien Méda.*

Renkonto kun la grupo Nebnooma

La prezidanto Thimothée Kaboré petas la financadon de projekto por bovida bredado en Gampela, apud Vagaduguo anstataŭ kokida bredado forlasita pro la minaco de birda gripo.



Poste vizito al la virina grupo **Delwende N'Paam Panga** en la vilaĝo Kounda (vd p.5)

Vizito en la hejmo de S-ino Agathe Sanou, prezidantino de la grupo Gnoumalon.

Financita projekto de produktado kaj komercigo de freŝaj fruktosukoj. S-ino Habibou Hapiou, kasistino, prezentis la fridujon financitan kun aliaj materialoj de MSM.

Dum la vizito oni prezentis al ni liofilizitajn produktojn. La rekonsistigitaj fruktosukoj estas bongustegaj.



Christian Trianneau kaj Symphorien Méda iris al la vilaĝo Gonsé Peul je la serĉo de Pulaj virinoj de la grupo **Guemnati**, kiu ricevis en 2004 financadon por ŝafida bredado kaj pri kiuj la novaĵoj estas multe tro maloftaj. Christian dumvoje kaj hazarde renkontis Romuald Sawadogo, responsanto de la NŜO **PROKLEB/CEPROFET**, kiu kadras la grupon Guemnati.



La rilatoj kun tiu grupo da analfabetinoj malfacilas. Tio pro pluraj kialoj : la savana situo de la grupo, la lingvo kaj konflikto kontraŭ la NŜO **PROKLEB** : (Centro por Produktado kaj Klerigado pri Tropika Bredado), kiu frontas gravajn malfacilaĵojn. Interkonsentaj kaj juraj solvoj estas nun esplorataj.

Ambaŭ responsantoj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato renkontis kelkajn virinojn tra savano, sed ne la prezidantinon S-ino Boli. Ili sukcesis paroli kun ili dank'al François Sawadogo, kiu tradukas inter franca kaj pula lingvoj. Kelkaj el tiuj dudek virinoj ricevis en 2004 la planitajn 4 ŝafojn, aliaj ne.

Vojaĝo ĝis Bobodiulaso, kie la vojaĝantoj estas akceptitaj de Dramane Traoré, okcidentafrika MSM-Delegito kaj plenuma direktoro de la NŜO AKAP/ADRI, partnero de MSM kaj de Bakary Ouattara, membro de la Pluzorga Komitato de la Bobodiulasa distrikto kaj prezidanto de la grupo Koboro en Dodugu.

Vizito ĉe la grupo Espero

Ĝia prezidanto Aboubacar Sédiki Konaté akceptas nin ĉe freŝiga ombro de mangarbo.

La grupo aliĝis al Monda Solidareco kontraŭ la Malsato antaŭ pluraj jaroj kaj sendis en majo 2007 al la NŜO AKAP dosieron por projekto de bovida bredado.





Post veturado sur foje asfaltitaj sed pli ofte ruĝteraj vojoj, ni iras renkonti la grupon **Pefourou-3** en Baré kaj ĝian prezidanton S-ro Sanou Moussié. Tiu fora grupo, kiu aliĝis en 2003, petas la financadon de projekto de tirbova agrikulturo.



Survoje al la vilaĝo Doumain, ni renkontas du grupojn, la viran grupon **Lanaya** kaj la inan grupon **Laidjalé**. Ili deziras aliĝi al Monda Solidareco kontraŭ la Malsato.



*En Doumain ni renkontas la lastajn membrojn de la grupo GAPO (Grupo Agropaŝtista en Ouezzinville) kaj la membrojn de du novaj grupoj, kiuj proponas, ke per kunuzado de la materialo ili helpas GAPO repagi sian prunton al MSM. Temas pri la vira grupo **Alla Ka Fin Mignan** kaj pri la ina grupo **Wourodini** (Vd. en la estonta bulteno).*

Ni plu iras al Dodugu, kie ni estas akceptitaj de la grupoj **Koboro** kaj **Sinigna-Sigi**, muzikistoj kaj dancistoj.

La ina grupo Sinignan-Sigi deziras peti financadon por grenmueliloj.



La vilaĝestro esprimis sian kontenton vidi la grupon Koboro financitan en 2008 por ties projekto de tirbova kulturado, sed ankaŭ sian maltrankvilon por la estonteco de la tuta vilaĝo izolita el la mondo dum pluvsezonoj, malproksima al lernejo kaj al flegejo.



Gea grupo Moĝibe-ĝi

Ni iras al la vilaĝo Samogohiri, je okcidento de Bobodiulaso, kie ni renkontas la grupojn **Moĝibe-ĝi** kaj Benkadi. Ni estas akceptitaj de la prezidanto Lassina Sawadogo kaj la sekretario Fabé Traoré.

Tiam la grupo Moĝibe-ĝi subskribas la solidarecan kontrakton por la konstruado de tenejo por nutrovaroj. (Vd. en estonta bulteno)



Ina grupo Benkadi

La 16an de februaro ni estas akceptitaj en la hejmo de S-ro Siaka Sanou, prezidanto de **GAPO**, kaj de S-ino Millogo Karotimi, prezidantino de la ina grupo **Yeregnini**.

Ni vizitas la stokejon kaj la nutrovaran montrejon mastrumatajn de la grupo Yeregnini. Tiu nutrokomerco estis financita de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato en 2005.





Poste ni iris viziti grupojn viran Sabarikadi kaj inan Benkadi en Sarfalo. La prezidanto de Sabarikadi, Iboudo Iwaaogo deziras akiri kampon por kultivi grenojn. La sekretariino Konate Adama aktive retkorespondas.

Reveniĝinte en Vagaduguon Christian Trianneau reveturis kun Symphorien Meda la dimanĉon, 17a de februaro, al la renkonto de la grupo Relwende en la vilaĝo Ziro, situo alirebla nur post trihora motorcikla veturado.



La prezidanto Zongo Abousalem kaj la kunordiganto Madi Simporé estis feliĉaj renkonti administranton de MSM.

Dankon al la instruisto Nelré Mahamadi pro la traduko de la interparoladoj.

La ege varmkora kaj bonetosa akceptado entuziasmigis la kvin vojaĝantojn. Tamen la administranto taskita per la dosieroj deziris pli da precizigoj pri kelkaj dosieroj, pli da ekzakteco en la taksado de la projektoj. Li atendas informajn kompletigojn per poŝto pri kaj far la koncernataj grupoj. Tamen la bilanco estas pozitiva.

Danièle Charier kaj Christian Trianneau.

Grandan dankon al Symphorien, al Bakari, al Dramane, kiuj konstante akompanis nin.

Ilia atentemo al ni kaj ilia organizemo ebligis, ke nia restado okazu en plej bonaj kondiĉoj.

Saluton kaj dankon al niaj stiristoj : Bertrand en Vagaduguo kaj Lassina en Bobodiulaso, kaj ankaŭ al Seni pro ilia afableco kaj ilia kompetenteco.

Claudine Tournier



Bertrand Kissou fondis « Samba Transport », juna turisma entrepreno, kiu proponas viziti Burkinion per lia Land Rover 110 (9 sidlokoj)
www.sambatrans.net



Lassina BARRO

Tiu ĉi bulteno estas precipe dediĉita al la raporto pri vizito en Burkinio. Tamen jen kelkaj

mallongaĵoj :

- Ø S-ro David Ngoy Tshite, kunordiganto de EKOFAM-Kongio en Kinŝaso transdonis agadan raporton, kiu estos publikigita en la estonta bulteno.
- Ø S-ro Serge Ludovic Bonos Mapili, prezidanto de la Agropaptista grupo en Bamboutou proponis sin fari la korespondanto de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato en Centrafriko, tiu mezafrika lando, kie pluraj kontaktoj kun kamparanaj organizaĵoj estas kurantaj. Dayrigote...
- Ø Kontaktoj ankaŭ en Haitio, kie tri organizaĵoj ŝus aliĝis al Monda Solidareco kontraŭ la Malsato. Temas pri Organizaĵo de la Junaj Universitatoj en Carrefour por la Antaŭenpupo de Haitio (OJUCAH), pri Organizaĵo de la Viglaj Inoj en Bauséjour (OVIB/OFVB) kaj pri la Unuiĝo de la Kadruoj por la Disvolvigo (UKAD). Bonvenon en la medion de solidareco.

Letero de legantino



Miajn gratulojn pro via artikolo en la unua pagho de N-ro 95 de Monda Solidareco! Paroli tiel klare pri <Post-UN-o> estas kuragha kaj necesa.

Ursula Grattapaglia

La vojoj de la solidareco

pasas tra Burkinio

En la vilaĝo Kounda, virinoj regas sian komercon de nutrovaroj

Dimanĉe, la 10an de februaro 2008, akompanate de la juna Burkina instruisto Nikiéma Dieudonné, la reprezentantoj de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato renkontis la inan grupon Delwende N Paam Panga en la vilaĝo Kounda je 15 km sude de Vagaduguo. Tiu ina grupo estis informita pri MSM dum antropologia staĝo farita de F-ino Fleur Sarano Enriquez en tiu vilaĝo antaŭ pluraj jaroj. De 2001 tiuj inoj kotizis al MSM ĉiun jaron por ke ilia projekto de grentenejo estu priatentata. Tio malgraŭ problemoj, ĉar unufoje iliaj kotizoj estis devojigitaj de malbonintenca falsa peranto. Sed ili daŭre plu informis MSM pri siaj malfacilaĵoj, neniam rezignante, kaj utiligante la servojn de homoj, kiuj povus atingi la administrantojn en Francio.

En la ĉeesto de ĉiuj inoj de la grupo, de iliaj infanoj kaj de pluraj spektemuloj allogitaj de tiu grava kaj silenta ariĝo, la solidareca kontrakto estis legita laŭ sia fina formo el la reciprokaj sindevontigoj atendataj por sukcesigi la projekton. La skribita teksto en la prezentita formo rivevis konsenton de ĉiuj flankoj, kaj en solena kvieteco respektata de ĉiuj la prezidantino kaj la sekretariino kaj la kasistino subskribis la kontrakton. Tiam estis granda emocio, ĉar temis pri la atingo de longdata projekto kaj pri promeso de pli bonaj tagoj por ĉiuj ĉi inoj.



Jam la ina grupo posedas masonitan konstruaĵon por stoki la nutrojn kaj jam eksperimentis tiun aktivecon dank'al la financado de alia NŜO antaŭ pli ol dek jaroj sed ĝi estis trompita de malfidinda peranto de tiu sama NŜO.

Tiu projekto nun nomita « Tenejo por nutraj varoj » estos financita de MSM post la rikoltoj de 2008, t.e. la periodo kiam la varoj estas malpli kostaj kaj povos havigi profitojn al la virinoj, kiuj podetale vendos tiujn nutrovarojn. Jam ekpago estis farita la 10an de februaro 2008 al la grupo post la subskribo de la kontrakto, dank'al la heredo de S-ino Brigitte Galluchon, forpasinta en Francio post longa malsano en 2007 kaj kiu deziris, ke tiu hereda monsumo estu atribuita al virina grupo en Burkinio.

Ni deziras sukceson al tiuj virinoj, por ke fortiĝintaj per tiuj provoj kaj apogataj de la filo de la prezidantino Nikiéma Dieudonné, instruisto en Dori kaj de la helpo de lia edzino, ili plibonigu siajn vivfontojn kaj fariĝu pli aŭtonomaj en tia lando kie, laŭ la administranto, oni tro malofte permesas la junulinojn plu studadi post la 12jariĝo.



Christian Trianneau

Plu en Kounda, la sama evento rakontita de Claudine

Ĝi estas nia unua vizito en savano, unua kontakto kun vilaĝanoj post 45 minutoj sur asfalto kaj sur polva kaj ĥaosa vojo : la sezono estas seka kaj la vetero freŝa (30 °). Ni trairas savanan pejzaĝon kovritan de graminacoj kun grandaj arboj en disaj lokoj (baobaboj, biglobosoj, kariteoj . .)*

Silenteco kaj soleneco ŝvebas sur la ĉeestantaro kiam la prezidantino, la sekretariino kaj la kasistino de la virina grupo subskribas la kontrakton por la financado de sia projekto : tenejo por nutraj varoj.

Ĝi estas la unua kontrakto subskribita « senpere » inter MSM kaj grupo, tio montras la gravecon de la momento. Neniu eraras, nekutima kaj grava io okazas sub la palavrarbo.

Kaj se en la komenco de la renkontiĝo staris nur la membrinoj de la grupo, iliaj familianoj kaj ni la kvin francoj akompanataj de Symphorien, Dieudonné kaj Bertrand, iom post iom la grupo plidensiĝas kaj larĝiĝas. Multaj infanoj kaj adoltoj piede aŭ bicikle venas kaj aŭskultas. Dank'al Dieudonné, juna instruisto kaj filo de la prezidantino de la grupo, la kontakto estas facila. Li entuziasme tradukas la morean lingvon parolatan en la vilaĝo en francan, kaj inverse.

La eksterordinara evento estas emociplena por ni ĉiuj. Ni premas multajn manojn, interŝanĝas dankojn

kaj salutojn por nia foriro. Denove la tervojo, la polvo, sed ŝajnas ke la pejzaĝo estas pli luma, tio ĉar la korvarmeco de la akcepto kaj la memoro de la pasintaj momentoj daŭras kaj la emocio plu ĵusas.

Claudine Tournier

* « *Parkia biglobosa* »

Tra Togolando

Projekto ŝafida bredado de la grupo « FLIFE » en Lomeo

La unua financoparto je 1 028 000 F CFA estis ricevita de la grupo la 24an de julio 2007. Ĝi celis la konstruadon de la ŝafejo kaj la rearanĝon de cisterno kaj de stokejo. La dua financoparto je 1 469 050 CFA F estis ricevita la 12an de decembro 2007 por la aĉeto de geŝafoj por komenci la bredadon.

La elektita situo por enteni la projekton estis translokita internen de loĝeja kvartalo sur parcelon jam provizitan per stokejo kaj cisterno. La 10 metrojn longa kaj 6 metrojn larĝa ŝafejo enhavas aĵuritan fasadon* kaj grandan pordon, kiu estas bone fermita dum nokto kontraŭ la ŝtelistoj. Por ebligi la trasorbiĝon de la urinoj la grundo ne estas betonita.

Fine de esplorado pri la ŝafa raso la elekto estis farita pri la raso Savalu. Ili estas altstaturaj ŝafoj tre ŝatataj de la islamanoj dum la festo « Tabaski » (*Eid ul-Adha*) kaj kies vendoprezo povas atingi 150.000 CFA F. Tiu grupo aĉetis dek ŝafinojn kaj unu virŝafon. Ĝi dungis junulon kiel ŝafiston por la prizorgado de la ŝafejo kaj por provizi la bestojn per herboj. Li atentis, ke la bestoj ne eliru el la ĉirkaŭbaritejo. Tuj post ilia alveno bestkuracisto zorgeme ekzamenis la sanstaton de la bestoj. Li sugestis la lokigon de lekŝtono por alporti kompletigon el mineralaj saloj al la bestoj. Ĝenerale kiel ĉiuj remaĉuloj, ili estas nutrataj per freŝaj herboj, kiujn la ŝafisto estas taskita regule provizi. Disponeblas ankaŭ stoko da sekiĝintaj maniokaj defalaĵoj kiel plia nutraĵo.



La prezidanto de la grupo, S-ro Gomado, dankas MSM pro la financa apogo kaj **3A** pro ĝia teknika apogo. Je la nomo de la Administra Konsilantaro de MSM mi ĝojas pri la seriozeco montrita de la grupo por instali la projekton. Mi dankas la prezidanton S-ro Gomado, kiu regule informis nin pri la evoluo de la instalado de la projekto kaj krome alsendis fotojn. Malpacience ni atendas la unuajn naskiĝojn de ŝafidetoj. Malgraŭ la distanco inter ni, ni preskaŭ senpere travivas la vivon de tiu projekto.

Joël André-Landais

* « claustra » en diversaj lingvoj.

... kaj tra Turlando (Francio)

Ĝenerala Asembleo de GLOBICENTRE

Globicentre, asocio de la regiono de Turo (loka filio de MSM) okazigis sian ĝeneralan asembleon la 28an de februaro 2008 kun la partopreno de 15 membroj. Ni raportis pri nia agado en 2007 :

- ♦ partopreno en la kampanjo « Planeda Urĝa Stato »
- ♦ alparolado en januaro al la kandidatoj al deputiteco 2007 pri la franca politiko de helpo al evoluigo
- ♦ ekspozicio de la verkoj de ses malliberuloj de la Tura arestejo (ses pentraĵoj estis verkitaj pri la lukto kontraŭ la malsato en la mondo per solidareco)
- ♦ en la kadro « RADIS-37 » (reto por agrikulturo daŭra kaj iniciatoj solidaraj) Globicentre kunorganizis publikan spekton kun la filmo « sur la kotonvojo », kunorganizis la marŝon de subteno al Janadesh kaj partoprenis en la festo de la « Kamparana konfederacio ».
- ♦ En novembro 2007 Globicentre aktive partoprenis en la deka « semajno de la internacia solidareco » en Turlando enkadre de la kolektivo CIDMAHT.
- ♦ La tradicia lotludo okazis la 2an de decembro kaj gajnis 693 eŭrojn. Ni rememorigas ke la antaŭa lotludo ebligis al ni kunfinanci kun MSM la projekton FLIFE.
- ♦ Ni akiris « Globidar-platojn » kaj stablojn dum la jaro.

La financa situacio de Globicentre estas sana ĉar je la 31a de decembro 2007 ni havis ĉe banko kreditan saldon de 2 390 Eŭroj.

Joël André-Landais

Monda Solidareco kontraŭ la Malsato

ĈAR la malsategon en la mondo naskas ne manko de nutraĵoj, sed internaciaj rilatoj

NEEGALAJ,

MALJUSTAJ,

MALHUMANAJ

ĈAR asistado foje helpas, sed ne kontraŭ-batalas la realajn kialojn de la malsatego,

ĈAR eblas agadi ekster la nunaj internaciaj strukturoj, kiuj ofte senefikigas la homamajn iniciatojn,

ĈAR nur la solidareco povas instigi justan redisdonon de la riĉaĵoj,

ĈAR la solidareco povas ekzisti nur per demokrataj rimedoj,

MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO estas asocio (sendependa de la ŝtatoj, sendependa de ĉiaj povoj) konsistanta el ĉiuj individuoj, ĉiedevenaj, kiuj deziras partopreni en tutmonda solidareco.

La **monrimedoj** de **MONDA SOLIDARECO** devenas de:

- ♦ la periodaj kotizoj de la aliĝintoj
- ♦ (la jara minimumo egalvaloras **unutagan** nutraĵporcion)
- ♦ donacoj kaj subvencioj, kondiĉe ke ili estu neniel trudantaj.

ĜI FINANCAS

- ♦ sociajn kaj ekonomiajn ĉefe kolektivajn projektojn rilatajn al la prinutra memsufiĉo, per subvencioj kaj seninterezaĵaj pruntoj. Ĉiu financado rezultas el "solidareca kontrakto".
- ♦ kaj nutraĵajn helpojn kun maksimumo de 20 % de siaj monrimedoj.

La administraj kaj informaj elspezoj ne superu 15 % (10,4 % en 2007)

Administrado kaj informado baziĝas sur bonvolemo.

DEMOKRATIO

Ĉiu membro rajtas pri baloto, propono kaj kontrolo.

MUTUALISMO

Ĉiu membro partoprenas egalece kaj en la kontentigo de siaj vivtenaj bezonoj, kaj en la koopera reciproka helpo.

FEDERACIISMO

MONDA SOLIDARECO respektas la identecon de ĉiu grupo. Ĝia praktiko unuigas la homojn ne samigante ilin.

TUTMONDISMO

Ĉar la nunaj plagoj estas mondaj kaj *monda problemo* necesigas *tutmondan solvon*.

MONDA SOLIDARECO ignoras la landlimojn, sin malfermas al ĉiu individuo deziranta partopreni en la monda solidareco, kaj sin metas sub la juĝorajton de la **KONGRESO DE LA POPOLOJ**, ununura asembleo transnacie kaj demokratie balotelektita je planeda skalo.

Kial Esperanto por Monda Solidareco ?

Nia solidareco estas tutmonden direktita. Ĉie en la mondo estas homoj, kiuj malfacile vivtenas. Ofte la malfacilaĵo esta ligita al la vivnivelo, al la propra kapablo certigi la nutradon al si mem kaj al la dependaj familianoj. La kialoj povas esti diversaj, ankaŭ la respondoj kaj la solvoj. En nia organizaĵo, ni proponas al la ĉialandaj homoj intersolidariĝi, por ke ili diru siajn malfacilaĵojn, siajn provojn, siajn projektojn, siajn sukcesojn aŭ malsukcesojn. Ĉu ni, fondintoj de la organizaĵo, povis certigi tiun senlandliman interŝanĝon per limigita lingvo, aŭ imperiisma lingvo, kiu tendencas trudi kulturajn modelojn al la homaj komunumoj sin hipokrite prezentante kiel lingvoj por internacia komunikado ? Kompreneble, ne ! Tial ni uzas la solan lingvon, kiu estas vivanta kaj neŭtrala por senlandlima komunikado, t.e. Esperanto.

La agado de la uzantoj de Esperanto estas en la kultura vivo la sama kiel la nia rilate al aliaj temoj : forviŝi la landlimojn kaj la regadojn inter la socioj per ilo, kiu ne trudas sin kontraŭ la lokaj kulturoj. Tio perfekte kongruas kun nia koncepto de lukto por la progreso.

Esperanto estas la oficiala lingvo de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato. Sed ni ne trudas Esperanton al la malsatantoj ! Ni studas la projektojn en la lingvo de niaj korespondantoj kaj ni informas ilin per nia bulteno *Monda Solidareco* unika titolo - en Esperanto - por ĉiuj niaj lingvaj eldonaĵoj.

Monda Solidareco kontraŭ la Malsato havas ĉirkaŭ 700 membrojn disajn en 32 landoj. Granda efiko de nia agado tia estas, ke multaj homoj eklernis Esperanton dank'al nia agado, eĉ dudeko da niaj membroj abonas du eldonaĵojn : Esperantan + francan, kaj tiel praktike

PERSONA PARTOPRENO

FAMILIA NOMO _____ PERSONA NOMO _____

NASKIĜJARO _____ (la rajto voĉdoni validas je 16a-j)

PLENA ADRESO: _____

POŝTA KODO : _____ URBO: _____ LANDO: _____

deziras aliĝi al **MONDA SOLIDARECO KONTRAŬ LA MALSATO**, al kies profito mi devontigas min pagi la minimuman jaran sumon je _____ [€EUR] [\$ USD] [£ GBP] [SEK] [CHF] [F-CFA]

ekde tiu tago : _____

Ĉi enmetita(*), mia unua pago (vd p.8)

subskribo,

EĤOJ EL LA AK

Plenaj per la memoro de la renkontitaj homoj dum la oktagoj pasigitaj en Burkinio Christian kaj Danièle nepre komunikis siajn fotojn, siajn emociojn, mirojn kaj demandojn dum la Federacia Administra Konsilantaro, la 108a kunveno okazinta en Parizo la 1an kaj 2an de marto. Tiu vojaĝo sur la vojoj de la solidareco, farita kun Globidaraj amikoj estis unua eksperimento, kiel anoncote en la pasinta bulteno. El tiu unua fojo oni necese ricevas kelkajn instruojn. Ja ! ĉar eble la eksperimento denoviĝos.

Memdemandoj

La administrantoj faris al si multajn demandojn pri la funkciado de nia asocio. Ho ! nenio kontraŭ la bazoj, kiuj ebligis teksti mirindajn rilatojn kun multaj homoj en pluraj dekoj da landoj. Ne. Tamen oni ne timu sin demandi pri la rolo kaj efikeco de la strukturoj kaj de la interkonsentoj. Tiel estas pri la « Pluzorgaj Komitatoj » kiuj penas, pri la NŜO el kiuj la administrantoj multe esperas, sed kiuj ŝanĝiĝas kaj sendube ŝatus pli densajn rilatojn, pri la solidarecaj kontraktoj preskaŭ senŝanĝaj laŭ prezento, sed kies plenumo sin batas kontraŭ la realecoj de la ĉiutaga vivo kaj de la medio.

La projektoj

Neniu nova projekto estas deklarita « elektebla ».

Estas deklaritaj « financeblaj » :

- ◆ en Benino : la projekto de komunuma muelado de la Junaj Agrikulturistoj en Comé (07.04.BJ). Tiu projekto estas enkadrita de ECIDAM.
- ◆ en Burkinio : la projekto de bovinda bredado de la grupo « **Nebnooma** » en Vagaduguo (03.03.BF). En la komenco temis pri kokida bredado, sed pro la birda gripo necesis, ke la grupo pripensu alian aktivecon. La projekto estas enkadrita de AKAP.

www.globidar.org

John devontigis sin rearanĝi la ttt-ejon de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato. La novaj paĝoj kaj la novaj funkcioj estos je via dispono antaŭ la fino de la jaro.

Por la antaŭenpuŝo de MSM en Eŭropo iniciatoj multobliĝas : prelegoj en Belgio (Kortrijko) kaj en Francio en Lille kaj St-Georges les Baillargeaux, standoj en Turlando kaj en Burgonjo, artikoloj en gazetoj ... sed la efikeco plu malaltas.

Kaj fine, tiu kunveno en Parizo estis okazo akcepti S-inon Marie-Françoise Lamperti, prezidantino de « **Agadi por la Homaj Rajtoj** ». Tiu asocio, membro de ASKOP, estas en rilatoj kuna la senpaga gazeto « La Grande Epoque » (1.700.000 ekzempleroj). Prezento de MSM povos esti enpresita.

La estontaj kunvenoj de la Federacia Administra Konsilantaro okazos en Gemeaux la 24an kaj 25an de majo, poste la 13an kaj 14an de septembro en Nouaillé-Maupertuis.

Daniel Durand

La financoj de 2007 per kelkaj ciferoj :

Enspezoj :

Kotizoj kaj donacoj :21 193 €

Repagoj :1 143 €

Vendoj, abonoj kaj diversaj :358 €

Kunfinancado :1 903 €

Elspezoj :

Informado kaj komunikado :2 256 €

Administrado :978 €

Diversaj (el kiuj : asekuroj) :105 €

Financado de projektoj en 2007 : EKOFAM, Ngope Dighnane, Verda Fingro, Teddungal Sippobe, FLIFE, ECIDAM, por sumo de17.000 €

Monda Solidareco

Estas bulteno eldonata de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**

JE VIA DISPONO :

Ø Aliĝiloj

Ø Flugfolioj pri projektoj

Ø Pliajn bultenojn

Ø Federacia Reglamente de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato

Ø Afişetoj (A3-formato)

Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)

Nur por Eŭropo :

Ø Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikotĉemizoj 15 € kun la emblemato « *Fonds Mondial* ».

Ø Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « *Solidarité Mondiale contre la Faim* » + emblemato : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €

Ø Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : Kiel pagi ?

Äper franca ĉeko al **Globidar**

Äper poŝtaj rimedoj, je la nomo de :

SMF- MONDA SOLIDARECO

(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)

RIP:

FR21 2004 1000 0110 7349 6Z02 056

Äper banka karto aŭ **PayPal** tra la ttt-ejo

Ä ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.

ÄFEL kaj UEA kontoj : **mfsk-g**

Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. (situacio je la 6^a de majo 2008).

RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

Januaro 2008 2 083 €

Februaro 2008 975 €

Marto 2008 2 129 €

MONDA SOLIDARECO estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

Jara abono : 5 €

Redakcia komitato : Alain Bal, Danièle Charier, Daniel et Odile Durand, Hotto Abdoulaye, Joël André Landais.

Fotoj el la fototeko de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato **Desegnoj :** Yamsina Sahraoui Elfrancigis Daniel Durand,

Directeur de la publication : Daniel Durand

CPPAP n° 0410 G 86482.

Imprimerie de l'association.

Tel : +33 (0)241 78 47 75

info@globidar.org

www.globidar.org

MONDA SOLIDARECO

Les Nids

FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE

Francio